



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jara abono 30,- GM

Pilo-Press la
plej rapida
informilo en
Esperanto

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 37/77 - 22 sep 1977
Aperas ĉiusemajne

Denove: Vojaĝo al Pollando

Akcepto ĉe Kardinalo Tomasek

Itala Karavano al la IKUE-Kongreso

Triento (pp) - Ĉi-sekve ni publikigas ekstraktojn el raporto de Kavaliro Germano Gimelli pri la vojaĝo de itala karavano el Ĉenstoĥova. La kompletan raporton ni publikigos en Eŭropa Esperanto-Revuo, 4/77:

Antaŭ kelka tempo mi parolis pri aktivaĵoj favore al Esperanto en Suda Italio. Hodiaŭ mi raportas pri la aktivaĵoj en Norda Italio fare de la "Associazione Esperantista Trentina", kiun gvidas kav. Alfredo Bassetti, nome pri la Itala Karavano al IKUE-Kongreso ĉe la "Nigra Madono" en Ĉenstoĥova.

La longa aŭtobusa vojaĝo startis de Trento la 15-an de aŭgusto, frumattene, kaj atingis Tarvisio post haltoj en Verona kaj Udine, por akcepti la lokajn gepartoprenantojn. Aliaj haltoj okazis en Leoben, Vieno, Brno, Ostrava: Pinfine ni alvenis en Ĉenstoĥova.

En ĉiuj urboj la lokaj geesperantistoj salutis kaj pasigis iom da tempo babilante kun la gepartoprenantoj. Tiu ĉi fakto tre impresis ĉiujn, precipe la novbakitajn esperantistojn kaj la neesperantistojn kiuj partoprenis en la karavano por plenumi la liberajn sidlokojn.

La tri tagoj de la kongreso estis vere impresaj ĉu pro la kongresaj aranĝoj ĉu pro la imponaj mes-kuncelebradoj de pli ol 60 diverslandaj pastroj gvidataj de ĉefepiskopoj kaj kun predikoj en Esperanto.....

Dum la kongreso la karavano vizitis Krakovon, kiu tre impresis ĉiujn pro siaj tre famaj artaj belaĵoj, kaj Auschwitz (Oswiecim), kie oni vizitis la triste faman koncentrejon, kie okazis multaj malbonaĵoj dum la jaroj 1940-ĝis 1945-a kaj kie ĉiuj estis kortuŝe impresitaj.

Sed post la mirinda Ĉenstoĥova-Kongreso, la itala 50-persona karavano daŭrigis la vojaĝon al Varsovio, kun reveno tra Vroclavo kaj Praha kie la ekskursantoj restis du tagojn kaj vizitis, kiu la helpo de la lokaj esperantistoj, la novan Kardinalon Frantisek Tomasek, Apostola Administranto de Ĉeĥoslovakio. Li benis la gepartoprenantojn kaj afable interbabilis kun ili kaj interalie diris: "Mi povas certigi mian simpatian al Esperanto", "Esperanto estas lingvo de amo", "la hodiaŭa mondo tre bezonas tiun interkomprenigan ilon".

La vizito de la urbo, akompanataj de la samideanoj, finiĝis en la sidejo de la grupo kie oni longe babilis kaj frate kunsidis kun la lokaj esperantistoj. La reveno okazis tra Plzen kaj Norimbergo, kiujn ni iomete vizitis kaj kie ni ricevis la viziton de s-ro Ludwig Pickel, kiu estis je dispono por mallonga interparolo. Alia halto por tagmanĝo okazis en Kufstein; tra Innsbruck, Brennero ni atingis Trenton kaj Veronon.

Alta distingo

Bologna (pp) - Per dekreto de la 2-a de junio 1977 la Prezidento de la Respubliko Italio distingis S-ron Germano Gimelli, la aŭtoron de la supra raporto, per la honora titolo "Kavaliro" de la Ordeno je merito de la Italia Respubliko. Pilo-Press kore gratulas!

S-ro Gimelli speciale aktivis sur la kampo de la fervojistoj-esperantistoj, li estas ankaŭ fervora filatelisto!

45-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

Oslo (pp) - La 45-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis de la 7-a ĝis la 13-a de aŭgusto en la norvega ĉefurbo kun partoprenantoj el Danlando, F R Germanio, Finnlando, Francio, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Aŭstrio, Svedio, Svislando kaj Hungario.

Okazis ĉ. 20 aranĝoj, prelegoj, diskutoj, arta vespero kaj ekskursoj. Pli detale pri la kongreso ni raportos en unu el la venontaj numeroj de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Ĉi-sekve ni publikigas la kongresan rezolucion:

La 45-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazinta de la 7-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1977 en Oslo, Norvegujo

- 1) denove apelacias al la blindulorganizaĵoj kaj al Eŭropa Regiona Komitato de Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj kun la celo ke ili faru la necesajn paŝojn por atingi internacian regulon laŭ kiu ĉiu blindulo translime vojaĝanta fervoje ĝuu la samajn favorajn kondiĉojn validajn por blinduloj loĝantaj en la respektivaj landoj. Ĝuste la blindaj esperantistoj kun multaj internaciaj kontaktoj grave sentas la mankon de ĝenerala ĉi-koncerna regulo.
- 2)...rekomendas al blindulorganizaĵoj intensigi sian laboron por plifaciligi internaciajn kontaktojn inter blinduloj per, ekzemple, interŝanĝo de eksterlandaj feriaj restadoj.

La kongresaj sekretarioj: Hans Breitenbach - Walter Wagner

25 jarojn GEFA-BULTENO

Frankfurt/M (pp) - La Germana Esperanta Fervojistia Asocio, kies ĉi-jara kunveno okazos de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro en Saarbrücken, povas memori specialan jubileon. En oktobro 1952 eliris la unua numero de ĝia informilo "BULTENO". Do "BULTENO" fariĝis 25-jara. Samtempe la nuna redaktoro de tiu informilo, presita kaj belaspekta, Wilhelm Grass, Solingen, povas festi sian 10-jaran jubileon kiel redaktoro.

El numero 4/77 de "BULTENO" ni citas: "Bulteno" travivis la ŝanĝeman politikon de la fervojo ĝis la hodiaŭa tago kun ĉiuj ĝiaj avantaĝoj, sed ankaŭ komplikadoj por la kultura agado de la fervojistoj. Tio speguliĝas en la sennombraj artikoloj, sed ankaŭ en la fakto, ke ni antaŭ kelka tempo devis redukti la pojaran eldonkvanton de ses al kvin numeroj kaj ankaŭ la sumon de la paĝoj. Tamen "Bulteno" estis kaj restis dum tiu kvarona jarcento la neforpensebla ligilo kaj komunikilo inter la GEFA-estramo kaj la membraro. Kaj eĉ por multaj neesperantistoj helpe de siaj germanlingvaj artikoloj aŭ specialaj numeroj ĝi fariĝis efika informilo kaj propagandilo.

"Bulteno" startas al la dua kvaronjarcento sub tute aliaj kondiĉoj ol tio okazis antaŭ 25 jaroj. Dum tiam la ĝenerala tendenco laŭ ekonomia vidpunkto supreniris, nuntempe oni ne povas aserti tion. Dum tiam la homoj ankoraŭ relative facile entuziasmiĝis por kultura agado liber-tempa, ili nuntempe preferas ne mem fari ion, sed rigardi la televidian programon, certe pli facila okupmaniero. Ni esperantistoj antaŭvideble devos multe streĉi por certigi ankaŭ estontece la regulan aperadon de nia komunikilo.

Pri Ora Pola Aŭtuno

Miedzygorze (pp) - De la ĉi-jara internacia esperantista feriado "La Ora Pola Aŭtuno" skribas s-ino Olga Hollenberg GDR: Al mi tre plaĉas en Miedzygorze. Ĉeestas 192 el Pollando, 12 el GDR, 20 el Britujo, 7 el Bulgario, 8 el Hungario, 10 el Italujo, 6 el Ĉeĥoslovakio, 3 el Belgio kaj po 1 el Francujo, Islando, F R Germanio, Sovetunio, Usono, Svedujo kaj Aŭstralio.

Nova Esperanto-Disko el Svislando

TRA L'MONDO Longdaŭra disko en stereo, 32 minutoj, rapideco 33, 12 popolaj kantoj. Kantas Olivier Tzaut, kiu ankaŭ eldonis ĝin. Prezo 26 svisaj frankoj. Havebla kontraŭ antaŭpago al jena ĉirkonto: Olivier Tzaut, Bellevue 20, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, pĉk. Svislando 23-3656.

Tiu disko estas vere agrabla surprizo. Ja, oni povas diri, ke ĝi estas unu el la plej bonaj Esperanto-diskoj. La kantado de Olivier Tzaut, lia agrabla voĉo kaj senripoĉa klara prononcado estas arta ĝuo. Sur la belaspekta, bone aranĝita kovrilo estas la Esperanto-tekstoj de la kantoj, aldonitaj estas folioj kun franclingvaj tradukoj kaj informoj pri Esperanta gramatiko en la franca. Aranĝis kaj muzike gvidis Roby Seidel. Haveblas ankaŭ kasedo. Sur la pagilo oni aldonu ĉu oni deziras diskon aŭ kasedon.

Esperanto en Radio

Terorismo estas momente la ĉeftemo ne nur/Federacia Respubliko Germanio. La krimoj de germanaj teroristoj influas ankaŭ la internacian politikon. Federacia Kanceliero Schmidt devis prokrasti sian viziton al Pollando kaj partia sekretario Gierek. Pri tio kaj la teroristaj krimoj objekte raportis ankaŭ la Pola Radio en sia radia ĵurnalo kaj en "Panoramo de Internacia Eventoj".

Ankaŭ la ORF-komentisto d-ro Peter Dusek tuŝis tiun problemon en la Esperanto-elsendo de 17/18.9.77. Li diris: "Kvankam la ĉi-semajnaj okazintaĵoj denove montris, ke Aŭstrio ankoraŭ statas relative pli bone ol la plej multaj okcidentaj industri-ŝtatoj. Ni ne povas resti indiferentaj pri - ekzemple - la terorismo en Germanio - jam pro tio, ke nuntempe ĉiuj ŝtatoj komplete interdependas. Kaj vere, ankaŭ ĉe ni oni reagis al tiu lasta atenco de la Baader-Meinhof-grupo tre diverse kaj ĉiukaze kun grandega emocio...."

Kio okazis pri la "Varsoviaj Kolonoj korespondaj"? Laŭ la leterkesto de la 15-a de septembro dum la pasinta semajno eniris nur 24 korespondaĵoj. Kun 4 korespondaĵoj je la koresponda pinto ĉi-foje estis Tom Mattison el Skotlando.

ORF-Regiona Programo: Ĉu oni ŝanĝis la mezon ondon aŭ entute ne plu elsendas la 5-minutajn informojn sur meza ondo? Ĉiukaze dum la 2 pasintaj ĵaŭdoj ni ne sukcesis kapti tiun interesan elsendon sur la kuinta meza ondo (203,4 m). Kiu povas raporti pri aliaj, pozitivaj spertoj?

Radio Roma estas aŭdebla ankaŭ en Japanio. Kyoochei Nakazima el Tokio skribis: "mi sukcesis kapti vian stacion la 15-an de aŭgusto/japana dato, sur 11.800 kiloheroj/signalraporto 5-3 sen intermiskoj; plejparte komprenebla la enhavo, kiun mi detaligas". Cetere el korespondaĵoj kaj propraj spertoj oni povas konstati, ke nuntempe la aŭskultebleco de Radio Roma pliboniĝis.

Radio Vatikana surprizis sian aŭskultantaron per interesa leterkesto, post la ĉiusemajna "liturgia penso". El la leterkesto ni eksciis, ke d-ro Josef Kondor el Neuwied estas la "pinta kolono" de Radio Vatikana. Servas multaj konataj nomoj, kiuj ankaŭ aŭdiĝas ĉiusemajne en Vieno kaj Varsovio.

Svisa Kurtonda Radio. En sia lunda elsendo d-ro A. Baur parolis pri aktualaj problemoj de la ruĝa kruco; signalraporto: 4 - 4 - 4.

La diverslingvaj noticaroj de la Itala Radio de la 4-a de septembro raportis pri la komenciĝo de la Itala Esperanto-Kongreso en Campobasso (3-a ĝis la 10-a de septembro).

ORF-Regiona Programo: Ankaŭ la elsendo de la 22-a de sept. ne estis aŭdebla sur meza ondo, do entute ne en Nürnberg.

Varsovio. 99 korespondaĵoj alvenis dum la semajno de 15.-22.9.77

Reagoj - opinioj

En Pilo Press 35/77 de la 6-a de septembro, vi esprimas la deziron foje inviti al Okcidento la grupon de F-ino Zuzanna Kawulok el Istebna. Ĉu mi povas atentigi vin, ke pasintjare, en oktobro - novembro, F-ino Kawulok kun sia grupo vizitis Belgion kaj faris rondvojaĝon tra ĝi?

Mi estas kvazaŭ certa, ke, kiam iu(j) grupo(j) de iu landa asocio invitus ŝin (ilin), ŝi (ili) certe volonte rezervus al tiu invito favoran sekvon.

Jan Bovendeerd, Belga Esperanto-Federacio, Mortsel

La plej grava valoro de "PP" estas krom ĝia tre abunda kaj interesa enhavo en bona, konciza, ofte sprita ĵurnalisma stilo, ĝia mirinda eĉ rapideco. Fakte, post la Esperantaj radio-disaŭdigoj ĝi estas la plej rapida informfonto pri Esperantaj eventoj de ĉiuj Esperantaj gazetoj kaj bultenoj. Mi sincere gratulas.

Mi ankaŭ dankas pro la afabla mencio en n-ro 35/77 pri mia raporto en Pola Radio pri IKUE-Kongreso. Tamen...en la noto okazis amuza eraro. Verŝajne kaŭzis tion la rapideco...Temas pri tio, ke mi ne estis "multjara prezidanto de la ĉefa Estraro de Pola Radio, sed de Pola Esperanto-Asocio!

Lech Kosieniak, Varsovio

Noto de Pilo-Press:

Mi petas pardonon pro tiu "misinformo". Kompreneble mi scias, ke s-ro L. Kosieniak estis multjara prezidanto de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio. Verŝajne okazis en mia cerbo - pro la rapideco - iu pensosalto de asocio al radio, kio estas signo, ke mi pensas pli multe en "radiaj ol en asociaj dimensioj".

Eŭropa Esperanto-Revuo

La revuo por la Esperanto-uzantoj

Komence de la venonta semajno aperos la 3-a numero 1977!

El la enhavo: Esperanto por Eŭropo, parolado de la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin dum la ĉi-jara Eŭropa Esperanto-Kongreso

Internacia Lernejo - Modelo por Eŭropo, detala kaj ampleksa raporto de ILEI-prezidanto Helmut Sonnabend pri la internacia lernejo en Saint Gérard, Belgio.

Vojaĝo al Pollando, interesa, vivanteca raporto de D-ro J. Kondor pri siaj vojaĝaj kaj kongresaj impresoj en Pollando laŭ la taglibraj notoj.

Rubrikoj: Panoramo, ilustritaj raportoj
Forumo, leteroj de legantoj
Esperanto en Radio, kun la unua parto de ampleksa analizo de "Esperanto en Radiofonio" de d-ro Antonio De Salvo

Sur la lasta paĝo estas prezentata Jan Klimek, la estro de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio, Varsovio kiel literaturisto.

Mendu vian ekzempleron! Prezo 2,- GM. Mendu ekzemplerojn por sendi al viaj amikoj en eksterlando!

Abono por 8 numeroj 16,- GM

Mendu ĉe: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

En numero 4/77 aperos la dua parto kaj fino de la analiza artikolo pri "Esperanto en Radio" de Antonio De Salvo kaj la unua parto de artikolo pri "Jubilea Kongreso" en Varsovio antaŭ 40 jaroj!